

NiaBulteno

ISSN:0871-9241


JULHO-DEZEMBRO 2005 JULIO-DECEMBRO • Numero 89

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio
Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto

Rua Dr. João Couto, 6-ªA, PT-1500-239 LISBOA • +351+217141359 • info@esperanto.web.pt • www.esperanto.web.pt

Werther Sacramento 1919-2005

Amika, fidinda, gaja, interesa, lernema, obstina, saĝa, vigla, zorgema. Tia estis Werther, kaj pri li nun restas nur memoro, eĉ se apenaŭ forviŝebla: Forpasis nia bibliotekisto, iama sekretario, iama libro-servestro — homo malvanta sed fiera, 67 plenajn jarojn uzinta kaj subteninta nian lingvon. pĝ.4-5



El niaj someraj aranĝoj...

Abunda estis la partopreno de portugaloj en la kutimaj nordhemisferaj somerferiaj esperantaj aranĝoj. Bedaŭrinde, el tiuj, multaj emis kundividi siajn memoraĵojn kaj spertojn en Nia Bulteno: Tial ĉinumere raportas nur Jozefo pri la 21-a R.P.E., Miguel BOEIRO pri Somere'05, kaj Rut pri KEF 2005. Pri la Universala Kongreso, Internacia Junulara Kongreso, kaj Aŭtuna KEJ-renkontiĝo, i.a., eble vi legos en la sekva numero. pĝ.6-8

Z-festo: nivelo neatendita

Plena programo ne maltrafis la tagon atenti la kreinton de nia lingvo kaj ties literaturon okaze de la lisbona Z-festo 2006. pĝ.9

Gravaj amikoj

Pri kiel al esperanto rilatas Agostinho da SILVA kaj António de MACEDO, du gravuloj en siaj fakoj. pĝ.13

esperanto.pt ?

Novajn regulojn — ĉu eble novajn rezultojn? pĝ.11

Nia junularo plonĝas ree!

Samtempe kun la ekspedo de tiu ĉi numero okazas la Atlantika Plonĝado 2006, junulara renkontiĝo organizata de PEJ en plaĝovilaĝo Areia Branca, mun. Lourinhã. pĝ.10+16



Ne maltrafu: Ĝeneralan Asembleon la 25-an de marto 2006 (pĝ.3)

Nia Bulteno (informa bulteno de
Portugala Esperanto-Asocio)
Numero 89 (jul.-dec. 2005)

ISSN:0871-9241

Redaktis:

António MARTINS-Tuválkin
Reviziis: Werther SACRAMENTO ☐
kaj Alcino ALVES

Eldonkvanto: 360 ekzempleroj
Abono (4n-roj, nur eksterlande):
8-ono de landa MA de UEA

Unuopa ekz. (86-89): 5,00 €

(aliajn n-rojn laŭpete)

PDF-e havebla el http://www.esperanto.web.pt/nb_jxusa.html

Finkompostita en: 2006.03.01



Portugala
Esperanto-
Asocio
Associação
Portuguesa de
Esperanto

(*peessoa colectiva de utilidade pública*)

☉ sabate 15:00-19:00; sideje

✉ Rua Dr. João Couto, 6 r/c A
PT-1500-239 LISBOA

☎ +351 217 141 359 ☉

☎ +351 217 933 924

✉ info@esperanto.web.pt aŭ

portugala@esperanto.web.pt

🌐 <http://www.esperanto.web.pt/>

📧 pea_diskut@yahooogroups.com

CAE: 91331 **NIF:** 501 547 312

Fondita en 1972.04.25

Landasocio de U.E.A. ekde 1979

K-ano A: Faria de BASTOS

Membroj: 122(+61) en 2006.03.02

Monata kotizo: 2,10 €

(emeritoj kaj sub-18-jaruloj:

1,00 €; malriĉuloj: 0,00 €)

Aniĝkotizo: 3,50 €

Pagojn al bankkontoj IBAN: PT50

0035 064 000 025 961 430 49 aŭ

NIB: 0035 064 000 025 961 430 49

GVIDORGANOJ: (ekde 2005.03.19)

Ĝeneral-Asemblea Stabo:

Prezidanto: Faria de BASTOS

Sekretarioj: Manuel RUAS (rez.)

Werther SACRAMENTO ☐

Estraro:

Prezidanto: José MARTINS

Vicprezidanto: MARTINS-Tuválkin

Sekretario: Alcino ALVES

Kasisto: Miguel BOIEIRO

Voĉdonantoj: Wilson BRÍGIDO

Alexandra G. e Paz

Hugo LOURENÇO

Kontrol-Komitato:

Prezidanto: A. da Silva ALMEIDA

Revizoroj: Vítor MARQUES

Francisco MELO

Neakceptebla, eĉ

se vane tia, estas la perdo kiun suferis la portugala esperanto-movado per la morto de Werther SACRAMENTO. Lian mankon oni sentas, i.m.a., tute maldekstre de tiuj ĉi linioj, kaj mi ne povas ne rememori lian severan intereson kaj senliman helpemon pri la redaktado de *Nia Bulteno*. Ne malofte ĉilastan mi uzis ankaŭ por la verkado de nekrologoj — jen trafa kombino: malnova movadano, lingve lerta kaj ofte ĉeesta. Neeviteble, li foje demandis: «Kiu do verkos mian nekrologon?» — El tiuj babiloj aperis decido almenaŭ pri titolo (vd. pĝ. 4-5)... La forpaso de Werther estis nur unu el la kaŭzoj de la malfruigo de tiu ĉi numero; aliaj estis difektiĝo de printilo kaj fotokopiilo (ĉu kontage?), “malapero” de artikolverkuntoj, kaj engaĝo en aliaj aferoj movadaj... Pro ĉio ĉi bedaŭras via *red.*

NEBALOTITAJ POSTENOJ:

Instruado: (vakas)

Libro-Servo: Silva ALMEIDA

Biblioteko: Werther SACRAMENTO ☐

(periodaĵoj) Wilson BRÍGIDO

(eltondajoj) MARTINS-Tuválkin

(sonregistroj) Carlos MOREIRA

(diversaĵoj) (vakas)

Fotarkivo: Olga ALMEIDA

Subvencioj: (vakas)

Gazetaro: (vakas)

Ekspozicioj: (vakas)

Ret-kaj komput-aferoj:

Nuno MAGALHÃES

A. MARTINS-Tuválkin

Luís OLIVEIRA

Sidejmastrumo: Pedrosa ALVES

HONORAJ MEMBROJ:

António da Silva ALMEIDA

Alsácia Fontes MACHADO ☐

Manuel de FREITAS ☐

Alberto Pedro da SILVA ☐

Adelino Franco SIMÕES ☐

Manuel de Sousa TEIXEIRA ☐

LOKAJ SEKCIJ:

PLUS — Portugala Loka Unua Sekcio (nordokcidenta sekcio)

Repr.: Nuno MAGALHÃES

Fond.: 2002 **Membr.:** 15(+9)

✉ Rua Paulo da Gama, 550-12ªA
PT-4150-589 PORTO

☎ +351 917 721 868

✉ plusanoj@clix.pt

🌐 <http://www.esperanto.web.pt/>
plus.htm

JUNULARA SEKCIO:

Portugala Esperanto-Junularo
Jovens Esperantistas de Portugal

Fond.: 1993 **Membr.:** 24(+4)

(L.S. de TEJO ekde 1996)

🌐 <http://www.esperanto.web.pt/pej.htm>

✉ pej@esperanto.web.pt

☎/✉: ĉe P.E.A.

ALIAJ ORGANIZOJ:

Nogeso — Norda Grupo de Esperanto-Studado

☉ kafejo *Estrela d'Ouro*; str.

Fábrica; Oporto (antaŭaverton)

✉ nogeso@gmail.com

🌐 <http://www.nogeso.cjb.net/>

☎/✉: ĉe PLUS

Saluton! — Cooperativa dos Amigos do Esperanto e da Natureza

☉ 2-an dim. ĉ.m. 15:00; Cacém

✉ Avenida Bissau Barreto, 2

PT-3360-191 PENACOVA

✉ Rua do Miradouro, 12

PT-2735-300 CACÉM (SNT)

LANDAJ REPRESENTANTOJ:

U.E.A.: Manuel PINGUINHA (ktzp.)

ILEI: João SANTOS (deleg.)

E.E.U.: Faria de BASTOS

TEJO: Alexandra PAZ (A-kom.)

ILERA: Francisco MELO (CT1CGE)

EJA: Faria de BASTOS

SAT: Pedrosa ALVES (ktzp.)

IKEK: Alcino ALVES

IKUE: Salete dos SANTOS

ASOCIO:

Plia heredaĵero el Saldanha Carreira

Nepo de Saldanha CARREIRA, grava gvidanto de la portugalia esperanto-movado en 1915-1970, transdonis al P.E.A. eron de la esperantaj havaĵoj de sia avo. Estrarano Alcino ALVES prizorgis la ricevon kaj inventaron: Enestas libroj kaj gazetoj (kelkaj aparte atentindaj), abunda leteraro, dika gazeteltondaĵalbumo pri 1910-1916, kaj dosiero kun diversaj dokumentoj.

La tuto estis deponita en nia sidejo septembre kaj parto de ĝi estis tuj klasifikita — libroj, gazetoj kaj eltondaĵoj. La cetero estos kunigita al similaj dokumentaroj el aliaj gravaj mortintoj, **atendante** la manojn de **movada historiisto**.

Temas preskaŭ certe pri negranda ero de la tuta esperantrilata havaĵo de Saldanha CARREIRA. AA+AMT

ASOCIO:

De 2,10 € al 2,16 €

Jarkomence ekvalidis la nova **kotizkosto** (vd. NB86:6-7), laŭ decido de la Ĝenerala Asembleo, lastan marton: **2,10 € monate**. Dum tiu kunveno estis aprobita regularo kiu devigas ŝanĝon de la kotizkosto laŭ la inflacio de ĉiu ĵusa jaro. Tiu estas **2,3%** por 2005 (*indice harmonizado de preços no consumidor*, INE, 2006.01.13), do la kotizo **estos**, post rutina estrara decido, **2,16 € monate** (25,92 € jare), rabate 1,44 €; kaj aniĝkotizo 3,60 € (vd. pĝ.2). AMT

ASOCIO:

Donaco abunda!

En decembro de 2005 iu el nia membro donacis anonime al la asocia kaso kvincent eŭrojn (500,00 €), kio pli ol duobligas la jaran totalon de la spezrubriko pri donacoj. Jen ege oportuna kaj publike dankinda faro! ASA

AVISO CONVOCATÓRIO:

Assembleia Geral dos sócios da Associação Portuguesa de Esperanto

Nos termos do artigo 22^o dos estatutos desta Associação, convoco a Assembleia Geral para reunir em sessão ordinária no próximo dia 25 (vinte e cinco) de Março, sábado, pelas quinze horas, na sede social da mesma, sita no rés-do-chão «A» do prédio número seis da rua Dr. João Couto, ao Calhariz de Benfica, Lisboa, com a seguinte ordem de trabalhos:

- 1) Apreciação e votação do Relatório e Contas referentes ao ano de 2005, ouvido o parecer do Conselho Fiscal.

Convoco desde já a Assembleia Geral para reunir trinta minutos mais tarde, no mesmo local, se à hora marcada não se tiver formado quórum.

Luanda, 2 de Dezembro de 2005

O Presidente da Mesa,

Dr. Miguel Albino de Faria de BASTOS

HOMOJ:

La ĝojoj de maljuna Werther

Viglegan veteranon Werther SACRAMENTO, la 86-jaran bibliotekiston de nia asocio, trafis julie cerbarteria mislika koaglo. Ĝi kaŭzis svenon dum eksterosea bicikla promonado apud la tendumejo de *Melides* (mun. *Grândola*) kaj devigis lin al flegripozo. Li ekgastis en flegejo de maljunula asocio kiun iam li longe eĉ kunestris (*ARPIAC*, en *Cacém*, mun. *Sintra*), kaj baldaŭ eksuferis kompletan paralizon de la maldekstra korpflanko.

Laŭ liaj vortoj, tiuj lastaj vivmonatoj estis tempo de enorma humiliĝo kaj frustrado, kaj la perdita aŭtonomeco portis lin randen de memmortigo. Ĉe Werther plene konserviĝis mensklareco, kaj vizitinto notis ke lia malgrandigita kapablo paroli multe malpli damaĝis kompreniĝon per esperanto ol per lia denaska lingvo! Ekde aŭgustfino pluraj esperantistoj lin vizitis kaj transdonis ĉies unuvoĉan deziron pri rapida kaj senkomplika resaniĝo: «Ni plu bezonas vin!» (vd. pĝ. 6).

Sed vanis ĉia espero: La koaglon kaŭzis kancera metastazo, kaj eĉ post sukcesa fordreno neeviteblus tuja ripeto. Ĉilastan detalon Werther mem neniam sciis, kaj ni nur poste. Tial estis ŝoke, la 3-an de novembro, ekscii pri lia forpaso.

Kremacio okazis en la tombejo de *Olivais* la matenon de 2005.11.06. La ĉerkon kovris flagoj de esperanto kaj de la Portugala Komunisma Partio.

Naskita en Acoroj (en urbo *Ponta Delgada*), Werther baldaŭ akompanis familian transloĝiĝon al Madejro,

el kie ili venis kontinenten jam en la jaroj 1930-aj. Kontakton kun esperanto li havis pere de patra interesiĝo, kvankam tiu malemis lian okupiĝon pri tiaj “dangeraĵ” hobiaj. Vane: Werther jes ellernis esperanton, ekpartoprenis piknikojn kaj festenojn, kaj (post junulaĝaj aventuroj kiuj portis lin al Hispanio kaj Maroko) inter la movadanoj trovis sian estontan edzinon, Manuela (vd. *NB37:2*).

La postajn jardekojn Werther uzis esperanton ĉefe kun eksterlandaj leteramikoj (i.a. la poste famiĝonta Juan RÉGULO Pérez, vd. *NB65:18*), sekve de la movada regreso dum la diktaturo kaj pro propraj familiaj kaj profesiaj devoj. Laborante kiel tipografo (kompostisto, presisto kaj buĝetisto), lin hazarde kontaktis en 1980 George C. ROBERTS, usona esperantisto tiam estrarano de P.E.A. Tio kaŭzis lian remembiĝon kaj reaktiviĝon, pli intense post vidviĝo kaj emeritiĝo, fine de la 1980-aj jaroj: Li rolis kiel ĝeneralasemblea sekretario (2001-), estrara sekretario (1986-1993) kaj estrarano (1993-2001), redaktoro de *NB* (1998-1999) kaj ties kunreviziisto (1989-), libro-servestro (1989-1991), kaj bibliotekisto (1991-).

Sed la plurjardeka movada engaĝo de Werther, male al plejmultaj samgeneraciaj veteranoj, estis ne tiu de gvidanto sed de ano. Ne eblas diri tamen “simpla” ano, ĉar tia li tute ne estis: Klera kaj atentema, li estis nek la eterna komencanto, nek iu altranga verkisto aŭ instruisto; nek ermito malaperinta, nek ĉiama postenulo:

Werther epitomas la figuron de idea-la “normala” esperantisto (nialande preskaŭ unika en sia generacio), kune kun oportano Fernando COSTA.

Werther estis kara amiko, kunulo de longaj babil- kaj labor-horoj. Lia admirinda ekzemplo restas neforviŝebla en mia memoro — kaj espere plu vivos ankaŭ en penso, sento kaj ago.

António MARTINS-Tuválkin

La templa gardisto

Oktobre 2002, ĵus fininta rapidan memlernadon per kurso elŝutita el interreto, mi penis kontakti PEA-n. Trovi la domon ĉe strato Dr. João Couto ie en Benfica estis pli facile ol trovi la kaŝitan apartamenton en kiu kuŝas la sidejo. Mi hazarde surklakis sonorilbotonon kaj atendis.

Subite la seruro malfermiĝis. Maljuna tamen vigla viro Esperante min salutis kaj parole kaj geste invitis sekvi lin en salonon, kie aliaj homoj, preskaŭ ĉiuj ankaŭ maljunuloj sidantaj ringe ĉe aro da tabloj Esperante parolis. Mia unua impresio kaj pri tiu vigla maljunulo kaj pri aliaj el ceteraj estis ke temis pri eksterlandanoj. Pro kio alia ili parolus Esperanton?

Post prezentiĝo kaj facila rimarko ke mia E-nivelo ne sufiĉis eĉ por balbuti abocon Werther SACRAMENTO ekparolis portugale. Tiam mi elspiris! Poste, iom post iom, la aliuloj ankaŭ ekportugalis. Do finfine mi rimarkis nenium eksterlandanon tie. Subite tiu aro de grandaĝaj E-babilintoj similis templajn gardistojn.

Ties haŭtsulkokoj daŭrigis esperantgralon en preskaŭ kaŝita apartamento. Dume Werther reliefigis noblecon de lingvoj, kiujn nur Esperanto po-

vus protekti, iom parolis pri historia E-movado en Portugalio kaj fine pri mastrumo de la sidejo.

Enskribigis min kiel PEA-anon! Do li estis mia bonveniginto al tiu preskaŭ sekreta mondo. Mi ne forgesos vin, mia kara Werther. Ĝis ĉiam!

Luís LADEIRA

Avanulo fidela

Ni ĉiuj funebras pro la perdo de nia karega samideano Werther SACRAMENTO. Mi speciale neniam povos forgesi tiun fidelan amikon. En la esperantistaj renkontiĝoj kiujn mi organizis, mi ĉiam deziris la partoprenon de plejeble multaj samideanoj, kaj en ĉiuj mi havis la plezuron akcepti tiun fidelan esperantiston kaj amikon.

Sed malgraŭ tio ke ĉi tiu okazo estas por ni tre malĝoja, ni neniam forgesu ke, por ni, estos por ĉiam granda honoro kaj ĝojo la fakto ke ni havis tiun gravan samideanon ĉiam, au preskaŭ ĉiam, kiel unu el la avanuloj de nia Portugala Esperanto-Movado. Adiaŭ, fidela amiko Werther!

Manuel José PINGUINHA

Ekzemplo pri idealismo

Sciante pri la forpaso de Werther, mi sentas min kvazaŭ mi perdintus spiritan patron. Li multe kontribuis por ke hodiaŭ mi estu esperantisto kaj sentu min fiera prie.

Mi ne sukcesis brakumi lin en la vartejo antaŭ flugi al Angolo. Tiu brakumo nun ne plu eblas. Memoro pri li, kiel homo kaj ekzemplo, eblas, indas kaj endas. Mi nepre memoros lin kiel unu el miaj idealismaj herooj ĝis la fino de mia vivo.

Miguel Faria de BASTOS

ARANĜOJ:

Trankvilo kaj gajo en Salkastelo

■ José Gaspar MARTINS

Ĉi tiu renkontiĝo okazis en aparte malstreĉiga etoso. Malfrualvene mi tagmanĝis kun Irina kaj Marta (kunveturantaj ekde Lisbono), ne en la komunmanĝejo sed apud naĝejo en tre agrabla loko, ĝuante la varman veteron. La ekskursa buseto kolektis nin; preskaŭ plena, ĝi radiis ĝojon de la renkontitaj esperantistoj.

Ni tuj iris al Sankta Suzano (*Santa Susana*), tre bela alenteĵa ⁽¹⁾ vilaĝeto kie ni promenis vizitante la senmakulajn blankajn dometojn kun bluj strioj, kiel kadroj de simpla vivo. Sekve ni veturis preskaŭ al la alia ekstremo de la municipo ⁽²⁾: *Carrasqueira* (=dornkverkejo), vilaĝo de fiŝkaptistoj, antikva ligna haveno kun tradiciaj fiŝkaptaj ŝipetoj sur la apudmara laguno de Sado.

La tuta renkontiĝo, kiun partoprenis 25 esperantistoj (kaj tri neesperantistaj akompanantoj), okazis en malstreĉa etoso, sen tro da tempo-premoj kaj formalajoj. La posttagmezaj eroj estis allogaj, agrablaj, kun aktiva partopreno de la ĉeestantaro. Eĉ la teknikaj problemoj, kiujn oni spertis vespere

provante spekti filmon kun esperantaj subtradukaĵoj (vd. pĝ. 9), estis transformataj al ebleco gaje kunesti.

Ĉiuj “endomaj” programeroj okazis en ĉarma palaceto en la riverborda centro de la urbo, nun municipa biblioteko (*Solar dos Salemas*) — pruntita, same kiel la busetekskurso, de la municipestraro. La programo suferis ŝanĝojn tuj antaŭ kaj eĉ dum la renkontiĝo, sed senperturbe. El ĝi, mi elstarigus la karaokeadon: tre amuza tempo kun partopreno de ĉiuj! Post la komuna tagmanĝo, plejmulto vizitis paŝe la urbo-centron kaj kastelon dum aliaj — la P.E.A.-estraro — ...plie laboris kunvene! Dum la fina renkontiĝa fotaro multaj tenis mesaĝtabulojn salutante la amikon Werther kaj dezirante lian bonsaniĝon (vd. pĝ. 4-5).

Resume, mi dirus ke ĉi tiu estis unu el la plej agrablaj naciaj renkontiĝoj kiun mi partoprenis. La teamo organizinta ĝin estas salutenda (ĉefe Anĉjo, plus Hugo, Alcino, Wilson kaj Boieiro), eĉ se ili deziris prepari ion pli serioza! Ĉu mi iĝas raŭmista? Eble jes! Kaj mi sentis ke multaj aliaj dezirus estonte renkontiĝi en tia etoso...! ■

(2): *Alentejo*, tradicia provinco de Portugalio; esperantigata kiel Alenteĵo (fonem.) aŭ Transtajejo (etim.).

(1): Kun 1465 km², tiu de *Alcácer do Sal* estas la dua plej vasta el la 306 portugaliaj municipoj.

BIBLIOTEKO:

La laboron de Werther endas pluigi, li mem pri tio insistis jam oktobre. La estraro kunordigas do prian helpon de Antónia CARVALHO, António TAVARES, Eduardo CRISPIM kaj Rui PALMA. AMT



ARANĜOJ:

KEF'2005: kun kultur' en koro

■ Rut'

Mia pasinta esperanta somero komenciĝis en fora Helsinko. Antaŭe, dista kaj dolĉa amikeco estis ekfarita per LERNU.NET: Mi kaj Ale KOSSABELA jam kunridegis telefone sed neniam persone. Kiam li anoncis sian inviton al la tiujara KEF (**Kultura Esperanta Festivalo**) mi tuj komencis plani. Bedaŭrinde mi nur povis alveni por la lasta nokto.

Alveninte al la ejo je la tagmanĝa horo, mi ĉirkaŭrigardis kaj vidis kelkajn konatajn vizaĝojn. Mi salutis, tremis, kaj ekkonis Ale, la argentinan artiston. KEF tuj ŝajnis pli **kultura kaj civilizita**, kun malpli da homoj ol aliaj renkontiĝoj kiaj I.J.K. aŭ U.K. kaj **pli hejmeca**, kun programo tute okupita per literaturo, muziko kaj arto, kaj amaso da gravaj esperantaj verkistoj.

Tie, inter "Esperanto Desperado", miaj karaj samurbanoj (*); Jorge CAMACHO, kiu inspiris min per sia poezio kaj atento; Flávio FONSECA kiu fandigis min per sia muziko kaj malvanteco; kaj Sten JOHANSSON, en kies lerniga ateliero mi havis la plezuron partopreni; — tie mi estis hejme.

Por frenezaĵoj, sufiĉis la ĉeesto de Arnau, Duncan, Rogêner, kaj finfine la nekredebla koncerto de Ale. Mi bedaŭris maltrafi la tuton, kaj min rekomprenis ke, eĉ se Esperanto paliĝus en mia koro politike, socie au ideale, ĝi tie restos **eterne — kulture**. ■

(*) Temas pri Kopenhago, kie loĝas Rut, ne pri ŝiaj antaŭaj loĝurboj en aliaj landoj.

ARANĜOJ:

Stimula sperto

■ Miguel BOEIRO

Dum dek kvin tagoj (de la 30-a de julio ĝis la 14-a de aŭgusto) okazis en *Wissen* (Germanio), la 3-a «**Somere**», organizita de LU VON WUNSCH-Rolshoven. Ĉi tiu feria renkontiĝo havis tre klaran temon: «Por la kreskigo de Esperantujo». Inter la dekoj da partoprenantoj el Germanio, Belgio, Francio, Italio, Pollando, Irlando, Serbio kaj Usono, estis la unuan fojon du portugalaj geesperantistoj: Miguel BOEIRO kaj lia edzino Manuela.

Tiu somera renkontiĝo permesis al ĉiuj bonan progresadon: komencantoj, komencintoj, progresantoj, kaj spertuloj pri la internacia lingvo. Estis tre bona kunestado en kaj ĉirkaŭ agrablaj lokoj kie abundas verdaj arbaroj, floroj, riverakvoj de *Sieg* (alflua de la Rejno)...

Tie ni povis bone ripozi, promeni, ludi, naĝi, danci, en amuziga etoso, kaj ĉefe trovi novajn amikojn kiuj pri-traktis interesajn aferojn.

Okazis specialaj prelegoj pri esperanta gramatiko, moderna germana sano, organizado de laboro, birdobservado, kantolernado, gimnastiko, k.t.p.

Ni ankaŭ profitis por viziti historiajn monumentojn kaj por ekskursi al Kolonjo, *Blankenburg*, kaj *Hachenburg* — regionaj urboj, kaj tipaj urbetoj.

Ni ĝuis mildan temperaturon (ĉ. 20°C), sciante ke bedaŭrinde en Portugalio okazadis teruraj bruloj de arbaro en 40°C da varmeco.

Precipe ni multe lernis, kaj kunestis kun kleraj gesamideanoj en tre stimulantanta eksperimento. ■



R.P.E.: *Sunverta horo en Santa Susana: Wilson, Leal da SILVA, Boieiro, Pinguinha kaj Alcino. Malsupre (♣): Jozefo kaj Wilson bondeziras al Werther. (♣) Kelkaj estraranoj plu kunvenas restoracie: Jozefo, Ancxjo, Alcino kaj Hugo.* (pĝ.6)



R.P.E.: *Marta MARTINS kaj Paulo BRANCO sektajde en Carrasqueira.* (pĝ.6)



KEF: *Jomo kaj Kim (artistoj ne tute fremdaj al la portugalia esperanto-movado...), movas la helsinkan publikon.* (pĝ.7)

ARANĜOJ:

Neatendita nivelo en Zamenhoffesto

La 11-an de decembro lisbonaj esperantistoj festis, laŭ anonco, la 146-an naskiĝdatrevenon de Ludwik ZAMENHOF, kreinto de la lingvo esperanto.

Laŭ iniciato kaj **verva organizado** de estrarano Wilson BRÍGIDO, tiu festo okazis en la sidejo de Portugala Naturalogia Societo (favora cedo kiun peristies prezidanto Miguel BOIEIRO, ankaŭ estrarano de P.E.A.) kaj konsistis el tri ĉefaj programeroj kiuj plenigis la posttagmezon, de la 16:00 ĝis la 21:00:

Akceptis la alvenintojn kaj unue prelegis pri la temo «**Zamenhof**» Wilson BRÍGIDO mem, kiu pripapolis kelkajn interesajn kaj ne plene konatajn biografiajn detalojn.

Sekve la duan parton de la taga temo, «**Esperanta Literaturo**», priprelegis António MARTINS-Tuválkin: Tiu resumis kaj komentis samteman artikolon de Baldur RAGNARSSON (*esperanto* 1186: 223, 226, 229) kaj pledis por konstanta plikleriĝo de la esperantistaro ĉefe pere de konatiĝo kun la esperantlingva literaturo.

Sub la sama temo, sekvis serio da mallongaj **laŭtleĝoj** de esperantlingvaj tekstoj, fare de invititaj ĉeestantoj, laŭ

la ĉisuba tabelo. Finis tiun unuan parton de la programo spontana elpaŝo de António ALMEIDA, kiu deklamis la kamonian soneton “*Alma minha gentil*” laŭ traduko de LUZO BEMALDO.

La ĉeestantoj, kiu nombris ĉ. 25, tiam ĝuis manĝpaŭzon dum kiu oni gustumis vegetaranajn specialaĵoj, laŭ la reĝimo de la gastiganta organizo.

La programo sekvis kaj finiĝis per spektado de la filmo *Junulino kun perlo*, kiu rakontas imagan sed verŝajnan dramon intrigon rezultiĝintan la samnoman pentraĵon de Jan VERMEER, kun esperantlingva subteksto (surekrana teksttraduko). Temas pri la sama filmo spektita dum la septembra R.P.E. en Salkastelo, sed ĉifoje sen teknikaj problemoj (vd. pĝ. 6).

Endas mencii ke la tutan organizadon prizorgis Wilson BRÍGIDO, kun nur ioma helpo de Hugo LOURENÇO (filmo) kaj Miguel BOIEIRO (ejo). Krome notindas ke, kvankam la evento estis prezentita kiel loka (do neinda je longa vojaĝo), venis tamen du eksterlisboniaj esperantistoj, veturintaj suman distancon de 385 km.

Ŝajnas do ke okazigo de Renkontiĝo en septembro **ne malvigligas** la partoprenon en Zamenhoffesto decembre, eĉ se tiu estas pli eventplena ol simpla sideja vespermanĝo. Jen entute tre pozitiva sperto! AMT

LEGANTO	TITOLO	AŬTORO	TRADUKINTO
Manuela BOIEIRO	<i>Mia Penso</i>	L. Zamenhof	—
Manuela BOIEIRO	<i>Ho, mia kor'!</i>	L. Zamenhof	—
António ALMEIDA	<i>Birdo Fenikso</i>	H.-Chr. ANDERSEN	L. Zamenhof
Eduardo CRISPIM	(anekdotoj)	R. SCHWARTZ	—
Alcino ALVES	<i>Apologo</i>	Machado de ASSIS	Alcibíades de OLIVEIRA
Cosme RESINA	<i>Ŝtormo</i> (fragm.)	Carlos OLIVEIRA	António de MACEDO (*)

(*) El *Antologio de Portugalaj Rakontoj*, 1959, ankoraŭ vendebla; plie pri tiu ĉi tradukinto/verkisto sur pĝ. 13.

ARANĜOJ:

Junular' sur sablo

Post longega paŭzo, jen gvide de nova skipo reaperas **Atlantika Plonĝado**, la renkontiĝo de Portugala Esperanto-Junularo (vd. *NB71:3*). La nomon revivigis la organizantoj de longe planata iberia junulara renkontiĝo en Portugalio (vd. *NB83:9*), oportanoj Nuno MAGALHÃES kaj Alexandra PAZ. Tiuj du laboregis senĉese kaj dum vi legas tion ĉi (en 2006.03.03-06; vd. pĝ. 16) okazadas la rezulto: En la junulargastejo de *Areia Branca* (mun. *Lourinhã*) kunvenas por amuzo kaj debato ĉ. 35 junajesperantistoj, **plejparte el eksterlando** — kio igas ĝin la **plej grava** movada evento nialande depost la ILEI-konferenco en *Sintra* (1983; vd. *IL37:1*). Raporton en *NB90*. AMT

ARANĜOJ:

Katalunion revigle

Kataluna Esperanto-Junularo okazigos sian **printempan renkontiĝon** en 2006.04.29-05.01 en *Canet de Mar*, 41 km norde de Barcelono, denove (post la tre sukcesa evento de *Mataró*; vd. *NB87:6-7*) en la marbordo de regiono *Maresme*. Kulpas la nekredbla lastatempa kreskado de la junulara movado en Katalunio.

Ĉifoje ŝajnas ke ni sukcesos kunlaboron de la urbodomo, kaj tiel eblos aranĝi esperantaĵojn en la urbo mem. La gastejo troviĝas en la urbo mem kaj je 10 minutoj paŝe de la stacidomo.

Por tiuj kiuj ne konas niajn renkontiĝojn, jen fotaro: <http://www.esperanto-ct.org/fotoalbumo/>. Venu ĉiuj nin malkrokodiligi! *Ferriol MACIP i Bonet*

INFORMADO:

Verdula engaĝo

La aranĝo *Encontro Vida Verde* (*Odemira*, 2005.08.26-28; <http://www.vidaverde.pt.vu/>; ĉ. 170 ĉeestintoj) arigis homojn ligitaj al la t.n. “**alternativa medio**”: La programon konsistigis trejnnesioj pri tre **diversaj** (eĉ antagonaj) temoj — folkdancado, urba transportado, jogo, laŭnatura kultivado, tradiciaj konstrumetodoj, mediamikaj energifontoj, astronomio, kaj astrologio. Al ĉio tia la organizantoj volis **aldoni esperanton**, kiu ja konsistigas mem seriozan alternativon sur kampo ofte neglektata en “tiaj ĉi” rondoj, kaj tiucele kontaktis nian asocion.

Kolovon pri esperanto tie gvidis António MARTINS-Tuválkin, nome de P.E.A. Ĉeestis ĝin deko da homoj (same kiom similajn programerojn); almenaŭ plia deko kiu ne povis ĉeesti pro samtempaj engaĝoj informiĝis pri esperanto eksterprograme. Kiel atendite, ilia **intereso estis granda**, ilia kono pri lingvaj kaj movadaj detaloj — preskaŭ nenioma, kaj la neceso ĉe ili argumenti favore al lingva egalrajteco en interetna komunikado — nenia. AMT

APLIKADO:

e-Karikaturmuzeo

Retejo pri karikaturo prizorgata de la portugalia gazetarmuzeo (*Museu Nacional da Imprensa*), en Oporto, havas ekde januaro esperantlingvan tradukon (kun nemultaj eraroj!), apud portugal-kaj angl-lingvaj versioj. Kurioze, la tradukanto ne estas (dume) konata al ni. Paĝo pri ĵusa polemiko, http://www.cartoonvirtualmuseum.org/f_galeria_maome_srp.htm, atestas aktualecon. AMT

INFORMADO:

Kaĉo en la .pt...

Jam junie Nuno MAGALHÃES (komputlicenciato kaj fakulo pri telekomunikado) avertis pri la neceso atenti la ŝanĝiĝantajn regulojn pri akcepto de retnomoj sub la hierarkio ".pt" (Portugaliao). Fakte, en 2000 Gonçalo NEVES insistis sed vane klopodis ĉe la portugalia retnomatribua instanco (F.C.C.N.) favore al ties akcepto de la retnomo "esperanto.pt", uzota de nia asocio. Tio estis rifuzita surbaze de tio ke iu asocio ne rajtas forkapti kiel markon "malspecifan" vorton, kia estas nomo de lingvo (sed alilandaj esperanto-asocioj sukcesis post simila peto), kaj do P.E.A. adoptis la dependan retnomon "esperanto.web.pt". Februarmeze F.C.C.N. fakte anoncis "liberaligon" de la retnomatribua proceduro, kaj ni ree klopodos. *AMT*

INFORMADO:

*Simone pu(g)ne pri esperanto**

Labor kolego mia komentis ke en majo 2005 li aŭskultis radiprogramon kun Simone de OLIVEIRA (ĉu kiel gasto aŭ ĉu kiel prezentisto, ne sciatas): Telefonanta aŭskultanto misinspire kontribuis la refrenon ke «ni ĉiuj devas paroli la anglan, ja ĝi estas multe plu utila» k.t.p. Je respondo la malfeliĉulon telefone "bategis" rebate nia kantistino / aktorino, kiu krome defendis esperanton "unge kaj dente"! (Ĉio ĉi laŭ la rakonto de mia kolego, bedaŭrinde mem mi ne aŭdis...*) *Rui PALMA*

* Se iu scias pliajn informojn pri tiu ĉi evento, b.v. informi la redakcion.

INFORMADO:

Expolíngua remise

Imite al la sperto de pasintaj jaroj, ne eblis al nia asocio arigi la necesajn rimedojn por partopreni en *Expolíngua Portugal 2006*, fakekspozicio de lingvo-rilataj organizoj kie ni lastfoje ĉeestis en 1996. Necesus serioze kaj intensive okupiĝi pri tiu ĉi afero en venontaj jaroj — ne facilas, sed ege indas: Ja ĝin vizitas miloj da potencialaj interesatoj pri esperanto. (La pago de plej malgranda budo, 9 m², estas ĉ. 1000,00 €.) *AMT*

INFORMADO:

Lernejaj semajnoj

Escola Secundária Luís de Camões

La lernobjekto Angla Lingvo (10-a jaro) diskutas la demandon pri internacia lingvo. Mi estis proe invitita de koleginino tiufaka prelegi februarie pri tiu temo al du klasoj, en la lisbona mezlernejo *Luís de Camões*. Rezulte, dum la postaj tagoj (7-10 de marto), la glernantoj prezentos eseojn pri la instrumoj (inkl. pri esperanto) kaj teatraĵon diskutantan la problemaron, kun atento al la «danĝero pri pasiva elekto de la angla lingvo» kaj al la avantaĝoj elekti neŭtralan lingvon. Eksterlernejaj spektontoj bonvenas. *Wilson BRÍGIDO*

Col. N^a S^a da Conceição (Casa Pia)

Okazos "Lingva Semajno" en tiu ĉi lisbona lernejo la duan semajnon de marto. Pri esperanto, "malkovrita" rete de la lernantoj mem, okupiĝos unu el la pluraj temskipoj de la 10-a lernjaro, kiu organizos ekspozicion kaj kollokvon kun helpo de P.E.A. *AMT*

INFORMADO:

Lagunon hieroglifoj

En 2005.01.09-04.28 (labortage 09:00-17:30) okazas en la municipa arkivejo de Lagoa (Algarve) ekspozicio pri alfabetoj kaj skribsistemoj — kio estas tute nekutima temo, eĉ en lernejoj ekspoziciejoj. La organizantoj petis helpon de nia asocio, ankoraŭ decembre, kaj ricevis modifitan version de la unua sekcio de *Esperanto num Relance* (en <http://www.esperanto.web.pt/alfabeto.htm>, i.a.), pri skribo kaj prononco. La uzon de tiu materialo ankoraŭ ne estas al ni konata, sed misaŭguras la dume aperinta gazetara informo, kiu mencias na «*livros e painéis explicativos sobre os principais alfabetos utilizados na atualidade, inclusivé*» (tiel!) «*o esperanto, o braille, o morse e a linguagem gestual*» (nia emfazo). Detalojn en NB90. AMT

INSTRUADO:

Veterana rondeto perfektigis sideje

En la sidejo de P.E.A. komenciĝis decembre de 2005 ĉiusabata kunveno de interesatoj perfektigi sian “malakran” scion de esperanto. Temas plejparte pri malnovaj movadanoj kiuj ial sentas sin tamen ne plene certaj je la regado de nia lingvo. Plej ofte partoprenas Cosme RESINA, Eduardo CRISPIM, Pedrosa ALVES, Armando CARDOSO, Jaime CORREIA kaj, kiel invitita gvidanto, Wilson BRÍGIDO. Oni ekzercas per kunlegado kaj analizado de literaturaj tekstoj, nune de la brazila romano *Iracema*, de José de ALENCAR. Aldonaj studemuloj bonvenas. AMT

INFORMADO:

Gazetaro en 2005

Konatas al ni nur kvar mencioj pri esperanto en la portugalia gazetaro la ĵusan jaron: Aperis longa artikolo en *Kompleta* (6, 2005.08.18), suplemento de la madejra *Notícias* (tute el kunmetitaj tekstoj el nia retpaĝaro!). Malpli-longaj mencioj en kroniko de José Manuel SERRÃO en *Jornal de Notícias* (2005.12.14), kaj en *Público* du pri mortintaj esperantistoj: Alsácia MACHADO (ĉisube) kaj Manuel FIRMO. (Listo: http://www.esperanto.web.pt/eltond_e.htm) AMT

HISTORIO:

Ĉu pri Alsácia?

En gazeto *Público* de 2005.03.31 (5484, pĝ.5, rubr. “Espaço público”: “*Das mulheres ou apenas de algumas mulheres*”), historiisto kaj politikisto José Pacheco PEREIRA recenzas faklibron pri elstaraj portugalinoj de la jarcentoj 19-a kaj 20-a: «*completa ausência de Luísa Paulo, Aida Paulo, as irmãs Ferreira, Maria Machado, Helena Magro, Maria Luísa Costa Dias, Cecília Areosa Feio, Carolina Loff, Cândida Ventura, Fernanda Paiva Tomás, Dalila Rocha, Manuela Cândia, por aí adiante. A relevância de algumas destas mulheres está em terem sido dirigentes políticas quando mais nenhuma mulher fora do regime o era: Loff despachou com Manuilsky e Dimitrov, ou seja o topo da Internacional Comunista, abaixo de Staline; Machado era uma activa militante esperantista*»... (Emfazo nia.) Ĉu temas pri la konata poeto, esperantisto (Maria?) Alsácia Fontes MACHADO (1913-1991), honora membro de P.E.A.? (Vd. NB62:22 kaj NB70:18-19.) AMT

LITERATURO:

Agostinho da SILVA: 100-jarfesto

Pete de la heredaĵmas-truma asocio de Agostinho da SILVA, filozofo kaj eseisto kiu iĝis la portugallingva aŭtoro plej tradukita en esperanton, ni represas la jenan anoncon:

O mês de Fevereiro inaugura as Comemorações do Centenário do Nascimento de Agostinho da Silva, comemorações a realizar, por iniciativa da Associação Agostinho da Silva, em muitos locais (em Portugal e no Estrangeiro), em parceria com diversas instituições, desde logo com o Ministério da Cultura, ao longo de todo o ano de 2006. Ver programação em www.agostinhodasilva.pt.

Associação Agostinho da Silva
Rua do Jasmin 11, r/c
PT-1200-228 LISBOA
213422783 / 967044286
agostinhodasilva@mail.pt

Pri la ligo inter Agostinho da SILVA kaj esperanto vd. *ELV* 9: 4-5 (NB 71). La menciitaj verkoj (plejparte klerigaj eseetoj) daŭre vendeblas en nia Libro-Servo (kvankam multaj nur faksimile). ■

LITERATURO:

Verkoj preter la malapero de António de MACEDO

Unu el la plej talentaj tradukistoj kunlaborintaj en la *Antologio de Portugalaj Rakontoj* (1959; vd. pĝ. 9) estas António de MACEDO, samrange kun Manuel de SEABRA (la kompilinto) kaj Alberto Pedro da SILVA. Mallaŭ la unua el tiuj, li ne foriris eksterlande en la 1960-aj, sed mallaŭ la dua, li perdis kontakton kun la movado kaj ĉesis aktivi.

Direndas ke la aktivado de António de MACEDO ĉesis nur kelkfake, inkl. de esperanto, sed viglas plu, eĉ je 75-jareco, sur elektitaj kampoj: Estis li la reĝisoro de pluraj avangardaj filmoj kiaj *Os Abismos da Meia Noite* aŭ *Chá Forte com Limão*; publikigis plurajn eseojn pri kin-arto kaj -tekniko, arthistorio, filozofio, kompara religiologio kaj esoterologio (ne esoterismo!), kaj aŭtoris plurajn fantastajn kaj sciencfikciajn romanojn kaj rakontarojn (plej ĵuse *As Furtivas Pegadas da Serpente*).

Antaŭ nemultaj jaroj tamen, instige de Manuel de SEABRA, aperis gazete tri malnovaj (sed ne publikiĝintaj) esperantaj rakontoj liaj:

- "La aerolito" *La Kancerkliniko* 86: 13 (1998.04-06)
- "La mortinto" *La Kancerkliniko* 87: 11 (1998.07-09)
- "Vireco" *La Kancerkliniko* 88: 9 (1998.10-12)

«Kaj per tio finis mia esperanta "remalsaniĝo"», rakontas António de MACEDO: «la aĝrusto kaj miaj nemultaj neŭronoj ne eblis plion!», li aldonas ŝerce. Ligon al esperanto li loze tenas plu per foja kontakto kun esperantistoj alifakanoj: Manuel RUAS (kino) kaj MARTINS-Tuválkin (sciencfikcio).

Plie pri Macedo en intervjuo al brazila retejo *Intempol* en <http://www.intempol.com.br/NewsView.aspx?id=93>; vd. ankaŭ la libron de José de MATOS-CRUZ *António de Macedo: Cinema, a Viragem de uma Época* (Dom Quixote: Lisboa, 2000). Ĉiuj menciitaj numeroj de *La Kancerkliniko* haveblas por konsulto en nia sidejo. La menciita libro *Antologio de Portugalaj Rakontoj* haveblas en la asocia Libro-Servo. A. Martins-Tuválkin

HOMOJ:

La Oldulo kaj l' Amaro

* *Fasketo da pensoj ĉirkaŭ la morto de Fernando de DIEGO*

■ *Gonçalo Neves*

Plurspecaj katapultoj priĵetis Fernandon dum lia longa kariero kiel esperanta tradukisto. Eĉ ŝovinisman riproĉon de Ungar li devis elteni, kiam li, hispano, aŭdacis esperantigi verkon de angla aŭtoro!

Diego, profunda konanto de nia lingvo kaj literaturo, ŝajne ne tiom detale familiariĝis kun nia historio. Eble tial li ne memoris ke Cart, nia unua demotika demagogo, publike skurĝis Zamenhof pro ekuzo de "heziti" anstataŭ "ŝanceliĝi", dum li mem en siaj artikoloj uzis vortojn kiel "skvaro"... Ke la metodon de Cart imitis multaj, avidaj rapide populariĝi kaj gvidi amasojn. Ke ĝin imitas eĉ hodiaŭ pluraj podiuloj de nia verda mondeto. La recepto estas facila. Sufiĉas pilorii neologojn por akiri pli da voĉoj kaj sorigi sian kvoton de populareco. Ankaŭ Akademien tio helpas... Dum pluraj jaroj Diego disponeblis kiel taŭga furaĝo por tiaj soruloj. Nun lia korpo kadavras. Kiel elektebla celtabulo ankoraŭ restas Hauptenthal. Ankoraŭ eblas sterki la fantasmojn de la reformemo, kies kontraŭbatalo pravigas la promocion de ĉiaspecaj nuloj...

Por aliaj, espereble ĉiam pli multaj, restas la verkaro de Fernando de DIE-

go. En ĝi la zamenhofa lingvo vigle pulsas kaj delekte scintilas. Eble iam oni povos starigi veran tradukistan lernejon, kie oni studos kaj analizos la solvojn de Diego kaj aliaj eminentaj aŭtoroj. Eble tiam la proporcio de lerte kaj bele tradukitaj verkoj komencos pli rapide kreski kaj eĉ superos tiun de tekstoj plataj kaj sensalaj, eĉ se gramatike korektaj. Eble tiam esperanto imponos kaj impresos: ne kiel "tutmonda dua lingvo" — tia ŝanĉo egalas nulon — sed almenaŭ kiel prestiĝa kaj respektata idiomo literatura, kiun multaj kulturhomoj scipovos, eĉ se nur pasive, por koniĝi kun la bonaj verkoj tradukitaj en ĝi kaj kun la bonaj originaloj karambole rezultintaj el tia tradukstrebado.

Ĉiaokaze la verkaro de la oldulo ekspluateblas jam nun. 3560 paĝoj da klara kaj elasta stilo sin proponas kiel fonto de plezuro kaj lerno. En la nuna jaro, kiam oni festas la 400-jaran datrevenon de Donkiĥoto, oni komencu ekzemple per tiu 820-paĝa verkego. Oni ne nur paradu per ĝi en publikaj ceremonioj por impresi skabenojn kaj ĵurnalistojn. Oni ja apertu la pezan volumon en la silento de sia alkovo kaj legu el ĝi, en verva esperanto, la instruajn aventurojn de la plej fama vaganta kavaliro. Kaj legante oni lernu verki pli bone kaj paroli pli bone. La belo bele. Dankon, Fernando. ■

MOVADO:

Pri ni la gazetar'...

En *NB90* legeblas finfine pri la pola I.J.K.; dume rimarkindas pria foto apero de **Rut, Maria Jesus kaj João GONÇALVES** en *TEJO tutmonde* **112: 11.** ▶

* Represita el *Fonto*; aperis ankaŭ en *Boletín*. La unua parto publikiĝis en *NB88:10-11*.

BULTENO:

Ĵusaj fuŝoj

Jen tajperaroj kaj aliaj misoj aperintaj laste en *Nia Bulteno*. (paĝo, kolumno, sekcio; linio; minuse supren sencon):

Nia Bulteno 87 (2005.01-03)

1 1 1 -1	ĉeesantaro	ĉeestantaro
2 1 8 360		380
2 1 16	2005.03.24	2005.03.26
3 3 1	(sen substreko)	
3 2 2 -4	al la antaŭa jaro	la antaŭan jaron
3 2 2 -4	vive	vigle
4 1 9	su-	sub-
7 1	Farri	Sylvie
9 3 4	-lisbonaj	-sidejaj
10 3 3 5	...topara	...to para

Nia Bulteno 88 (2005.04-06)

1 1 1 -1	urbeto	urbo
1 1 4 1	Fabian	Fabien
3 1 1 10	2003 kaj 2004	2004 kaj 2005
4 2 -9	Salatia Vrbe	Salacia Vrbs
7 2 1 2	IKJ	IJK
7 3 1 -2	Saenz	Sanz
8 2 5	instruada	instruata
8 2 10	D'Ouro	d'Ouro
8 2 -7	Xaime	Jaime
8 2 -5	Portugalion	Portugalio
11 2 -8	blid-ŝtria	bild-ŝtria
12 -1	klerigo	kleriĝo
12 1 -1	AM	AMT

✉ Leteroj Amikoj ☐

«Mi estas Kevin ROBB, kaj mi loĝas en Aŭstralio, sur la Oro-Marbordo, kiu situas 100 km sude de Brisbano, la ĉefurbo de Kvinslando. La Oro-Marbordo estas la ĉefa turisma regiono de Kvinslando, kaj oni trovas golfludejojn, amuzparkojn, belegajn plaĝojn, subtropikajn arbarojn kaj sukero-farmojn ĉi tie. Mi havas 34 jarojn; mia fianĉino nomiĝas Andrea, kaj ties 7-jara filino Danielle. Ili estas el Nov-Zelando. Mi laboras por telefona firmao. Mi ŝatas naĝi, legi, vidi kino-filmojn, kaj vojaĝi. Mi lernis Esperanton antaŭ 8 jaroj. Mi deziras korespondi Esperante kun samideanoj de Portugalio. Mi preferas korespondi per retpoŝto.»

Kevin ROBB

✉ kevrobb@bigpond.com

«Mi estas lernanto de la unua nivelo (en mia lando oni lernas du nivelojn de esperanto). Mi laboras kiel komputisto en komercentrepreno. Estas mia deziro korespondi pri ajnaj temoj kun homoj el la tuta mondo!»

Elvis RODRÍGUEZ Bory

✉ 15 Norte % 5 y 6 Oeste
Edificio 26, ap.^{to} 162B
Rp.^{to} Caribe
CU-95200 GUANTÁNAMO
CUBA

► Gazetaran videblecon havas ankaŭ **AKEL**, projekto kreita de **Luís LADEIRA** (vd. *NB88*:6-7): Revuo *esperanto* **1188** (januaro 2006) dediĉis al ties 3-a fazo, kunlaboro itala-bulgara-brita, longan laŭdan raporton. Fine, notindas intervjuo al usona movadano

William HARMON, aperinta en *esperanto USA* **41:5-6**: 7-9, kiun ilustras du fotoj de li en... **nia sidejo**. Ilin faris **Alexandre KASESA** (aŭtoreco tamen ne menciita gazete) en 1992, okaze de la dua vizito de Harmon al Portugalio (vd. *NB56*:4-5 kaj *NB57*:6-7). **AMT**



Dinosaŭroj kaj ventmuelejoj, vino kaj plaĝo. Stranga mikso pro kiu famas la portugala municipo Lourinhã. Ankaŭ tie estas vilaĝeto nomata Areia Branca, kie okazos la venonta

Atlantika plonĝado



<http://esperanto.web.pt/plongxu>



interŝanĝnumero



n° de sócio
ult. quora paga
lasta kotizpago
foto



DESTINATÁRIO:

REMETENTE:
Associação Portuguesa de Esperanto
Rua Dr. João Couto, 6-r/c A
PT-1500-239 LISBOA
PORTUGAL